**Rememoro pri Andreo**

Estingis la flamo de la vivo de granda homo, eminenta samideano kaj elstara artisto-pentristo, nia amiko Andrzej (Andreo) Kołpanowicz. Kiam mi vizitis Andreon je lasta fojo en Lia ateliero komence de ĉi-majo Li estis pentrinta siajn novajn bildojn kaj interese rakontis tiam pri ili kaj pri lingvoj. Estis granda plezuro por mi interparoli kun Andreo pri pentrarto, skulptarto, arkitekturo kaj kulturoj. Hodiaŭ 11an de julio je la lasta fojo ni adiaŭis Andreon kune kun kelkdekaj Esperantistoj, Lia familio kaj amikoj en tombejo de Kraków-Batowice. Dum la entombiĝo eĉ ĉielo ploris pro forpaso de nia kara samideano.

Andrzej Kołpanowicz naskiĝis la 1an de februaro de 1938 en Krakovo kaj mortis la 5an de julio 2017 en sia naskiĝurbo. Li studis ĉe la krakova Akademio de Belartoj kaj dimplomiĝis en 1967 ĉe la Fakultato pri Pentrarto de prof. Jerzy Nowosielski. Li praktikis stablan pentradon verkante pentrante ĉefe oleopentraĵojn en metafora-superrealisma stilo, kaj ankaŭ portretojn, aĵpentraĵojn, alivorte mutan naturon, neanimitan komponaĵon, kaj verismajn pejzaĝojn pere de akvarelo-tekniko. Liaj pentraĵoj estis prezentitaj en ambaŭ polaj kaj eksterlandaj ekspozicioj. Kvankam Liaj bildoj estas eksterordinaraj kaj adorataj de diverslandanoj Li preferis resti silenta kaj labori trankvile. Oni povas rigardi kelkajn el Liaj verkoj ĉe jena retpaĝo: www.andrzej.kolpanowicz.art.pl

Elstara estis Lia Esperanto-movado. Dum multaj jaroj Andreo kontribuis al "Esperanto-Tagoj de Krakovo" per siaj prelegoj kaj atelieroj aŭ koncertoj de gefiloj Julia kaj Joachim kunlaborante kun Krakova Societo ESPERANTO kaj kunorganizis "Amikajn renkontoj de samideanoj" en apudkrakova Krzeszowice. Ĉiam volonte kaj multfoje Li renkontiĝis kun samideanoj vizitantaj Krakovon kaj gividis ilin interese rakontante pri tiu reĝa urbo. Jen kelkaj prifotitaj renkontoj kaj aliaj eventoj, kiujn Andreo lastatempe partoprenis: www.kse.cba.pl/renkontoj/ Li sukcese ekinteresigis sian artistan familion pri la internacia lingvo danke al kio gefiloj fariĝis samideanoj.

Krom pentrado Li verkis tekstojn pri arto, sia regiono, vojaĝoj kaj aliaj aferoj. Andreo kunlaboris pri eldonado de "ApudVistula Bulteno" www.kse.cba.pl/bulteno.htm de Krakova Societo ESPERANTO kaj "Najbara Folio" www.kse.cba.pl/kunlaboro.htm de Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice. Andreo ankaŭ multon helpis ĝisdatigante retejon de KSE kaj instigis aliajn kunlabori.

Li tre edukita persono,  kiu multon legis. Montrante al sia biblioteko, plenplena da libroj kaj revuoj, etendiĝanta al kelkaj ĉambroj, Li ŝercis, demandante kun zorgo en sia voĉo: Kion poste faros kun ĉio-tio edzino de abonanto? Li ŝatus kolekti diversajn aĵojn ekzemple belajn afrikajn krucojn el Etiopio, unu el la landoj esploritaj de lia filo Marcin, ankaŭ artisto-pentristo. Pri pentrarto de Andreo oni verŝajne  povos ekscii ĉeokaze de prezentado dum venontjaraj Esperanto-Tagoj de Krakovo.

Ĉi-jare, verŝajne aŭtune, oni planas estigi artan eventon "Zaduszki" omaĝe al Andreo kaj aliaj forpasintaj artistoj. Estis por mi vera feliĉo ekkonatiĝi kaj kunlabori kun Li.

Adam Wilkus

/ Biografia priskriboj en pola lingvo:

http://www.andrzej.kolpanowicz.art.pl/biografia.php?lg=pl

http://przelom.pl/andrzej-kolpanowicz /